

# ELNA - Bulteno

Oficiala Esperantlingva Organo de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, N-ro 23.  
Decembro, 1973. Redaktas Karl Pov, 1014 Weymouth Avenue, San Pedro, CA 90732.

## KONKRETIĜAS LA CENTRA OFICEJO

La unuan de oktobro, d-ro E. James Lieberman, Prezidanto de ELNA, sendis kvar proponojn al la Estraro. Plej grava estis la lasta propono: "Starigi ELNA-Oficejon kun salajrata estro kaj oficiala libroservo." Li proponis Karlon Povon, redaktoron de *ELNA-Bulteno*, kiel Direktoron de la Centra Oficejo. La Estraro unuanime jesis la proponon.

La 3an kaj la 5an de novembro, d-ro Lieberman, s-ro Pov kaj ges-roj William H. Schulze kunvenis en San-Francisko por detale esplori la aferon. Ampleksa domo en la komerca distrikto de Burlingame, luebla je \$300 monate, estis elektita kiel sidejo.


Nun necesas *kvesti*. Kio estas tiu neologismo "kvesti"? Temas pri treege utila termino. Jen la difino laŭ PIV: "*kvest/i* (ntr). Peti kolekti monon, por religiaj aŭ bonfaraj celoj." Sen ia dubo, la aktuale plej bonfara celo por la usona mondlingva movado estas la firmigo de Centra Oficejo! *ELNA-Bulteno* do ĉi tie plenumas la unuan parton de la difino de "kvesti": ĝi petas monon. Por plenumi la duan parton, nome *kolekti*, ĝi bezonos vian helpon.

Alportu vian brikon al la Centra Oficejo per kontribuo por tiu celo al la Ligo, pere de ĝia kasistino, s-ino Peggy Linker, 1414 Monroe Street, Walla Walla, WA 99362. La ĉekon pagigu al "ELNA", kaj indiku sur la koverto, ke vi celas la specialan kason "Centra Oficejo".

Ne nur individuoj partoprenu. Ĉiu loka grupo povus nomi kvestiston por la Centra Oficejo, kiu havu kiel devon la kolektadon de mono ĉe ĉiu kunveno. Se ĉiuj esperantistoj ĉe ĉiu loka kunveno kontribuas eĉ nur po unu dolaro...

Ni esperas trovi monon ankaŭ ekster la movado, sed tio certe ne sukcesos se ni ne povos montri, ke la movado mem apogas sian Centran Oficejon.

Ĉio-ĉi estos, kompreneble, la ĉefa diskuttemo ĉe la ELNA-Kongreso en Ĉikago. Alportu viajn ideojn al la afero!



## ĈU LA KRIMSINDIKATO REGAS LA ESPERANTO-SOCIETON DE ĈIKAGO?

"Absolute ne!" asertas Ar Kent Ĝonz (naciliterume R. Kent Jones), prezidanto de la societo. "Fakte, la reputacio de Ĉikago kiel urbo de krimo estas plejparte nemeritata. Tiu reputacio de Ĉikago kiel urbo de rabo kaj murdo fontis en la tagoj kiam 'La Homo' (Al Kapone), ĉefo de la krimosindikato, uzis Ĉikagon kiel la centron de sia kontraŭleĝa distribuado de alkoholaĵoj. Post la nuligo de la usona prohibicio kontraŭ alkoholaĵoj antaŭ kvardek jaroj, Ĉikago fariĝis pacplena urbo. La ELNA-Kongresanoj la venontan decembron trovos Ĉikagon pli senkrima ol iu alia granda usona urbo."

Estas vere, ke la ĉikaganoj sentas sin pli sekuraj je la noktomezo ĉe State kaj Randolph en Ĉikago ol ĉe 42nd kaj Broadway en Nov-Jorko aŭ eĉ ĉe Wilshire kaj La Cienega en Losanĝelo. Tio ne signifas, ke krimo ne ekzistas en Ĉikago, sed kongresanoj kiuj loĝos ĉe la urbocentro ne havos kialon multe sin ĝeni pri tia danĝero.

Ar Kent Ĝonz aranĝos ĉambrojn en la kongresejo, Hotelo Allerton, por tiuj, kiuj deziras tiun servon. La taga tarifo estas \$13.50 por unu persono, \$18.50 por du (\$20.00 por du kun apartaj litoj) kaj \$25.00 por tri.

Nur San-Francisko inter usonaj urboj havas tiom da vere bonegaj diversnaciaj restoracioj kiel Ĉikago. La muzeoj de Ĉikago estas inter la plej bonaj en la

mondo. La Muzeo de Scienco kaj Industrio, la Muzeo de Natura Historio, la Planedarejo Adler kaj la Akvario Shedd estas paradizoj por la scivolemaj.

La interkona vespero de la ELNA-Kongreso okazos ĵaŭde, la 27an de decembro. Pro la samperioda kunveno de la Modernlingva Asocio en Ĉikago, ni havos la ŝancon aŭdi specialistojn pri lingvistiko kaj spertajn esperantistojn ĉe niaj kunvenoj. La kongresanoj ĉeestos Zamenhof-Bankedon vespere, la 28an, kaj finiĝos la Kongreso la 29an. Kongresanoj anoncu sin nun! Skribu al R. Kent Jones, 3318 N. Lake Shore Drive #801, Chicago, Illinois 60657.

#### *REGIONA KONGRESO EN NOVANGLUJO*

Gesamideanoj en nordorienta Usono povos ekzerci sin por la tutlanda kongreso en Ĉikago per partopreno en sia regiona kongreso, kiu okazos la unuan kaj duan de decembro en Pittsfield, Masaŝuseco. La tre varia programo inkluzivos jenajn erojn: Esperanto en la lernejoj; skoltoj kaj Oslo, 1975; Esperanto en 1976; rezolucioj al la ELNA-Kongreso; Zamenhof-Bankedo; kaj, por tiuj, al kiuj plaĉas, Esperanto-diservo, ĉe la unitariana preĝejo de Pittsfield, kun prediko en nia lingvo.

Al tiu ĉi jam tre riĉa sinsekvo de eventoj, aldoniĝas la ŝanco konatiĝi kun la Honora Gastino, Marjorie Boulton, ano de la Akademio, aŭtoro de tiom da gravaj libroj, ke via redaktoro domagās la spacon kiu necesus por ilin mencii.

Detalojn akiru de Esperanto, 195 Partridge Road, Pittsfield, MA 01201.

#### *NIA RIBELEMA JUNULARO*

La unua ĉiujara Juna Esperanta Konferenco Nord-Okcidenta (JEKNO) okazos en la usona ŝtato Oregonio de la 28a ĝis la 30a de decembro 1973. Esperantistoj el Brita Kolumbio, Vaŝingtonio, Oregonio kaj Nord-Kalifornio partoprenos ĉi tiun semajnfino de diskutado kaj distraĵoj. La temo estos "Akcepto de Internacia Lingvo: Ĉu fakto aŭ fantazio". La angla estos uzata por kelkaj eroj. Novuloj disponos seshoran intensan kurson de nia lingvo. Oni prezentos teatraĵon, filmojn kaj kantojn en la lingvo internacia.

La organizantoj sentas malkontenton

pri la progreso (aŭ ties manko) de la movado en Usono. Ili volas, ke la Konferenco formulu novan strategion, precipe por la nordokcidenta movado.

Aliĝkotiĝoj estas po \$25 por studentoj kaj lernejoj, \$30 por aliaj, inkluzive de loĝado kaj manĝaĵo. La afero lokiĝos ĉe la belega konferencejo Menucha, proksime al Portland. Kontaktu la JEKNO-Preparkomitaton, P. O. Box 966, Portland, Oregon 97207.

#### *LOKAJ GRUPOJ SIN ANONCAS*

Post la longdaŭraj plendoj de la redakcio pri manko de informoj pri lokaj grupoj, ni finfine ricevis kelkajn adresojn. Se via klubo mankas, ne ĝemu, sed informu nin tuj!

Gesamideanoj de la Bostona Regiono  
P. O. Box 283, Prudential Center Station  
Boston, Massachusetts 02199

Esperanto-Societo de Chicago  
3318 N. Lake Shore Drive #801  
Chicago, Illinois 60657

Esp-Klubo de Sudilinoja Universitato  
c/o s-ro Richard Ranc, Prezidanto  
Counseling Center  
Southern Illinois Univ. at Carbondale  
Carbondale, Illinois 62901

Esperanto-Klubo de Fenikso  
4155 N. 81st Street  
Scottsdale, Arizona 85251

Esperanto-Klubo de Los Angeles  
430 Peck Drive  
Beverly Hills, California 90212

Esperanto-Societo de San Diego  
3468 Juniper Street  
San Diego, California 92104

Esperanto-Klubo de Lompoc  
310 W. North Avenue  
Lompoc, California 93436

SFERO (San Francisco)  
P. O. Box 508  
Burlingame, California 94010

Esperanto-Societo de Portland, Oregon  
4426 N. E. 37th Avenue  
Portland, Oregon 97211

## LETEROJ AL LA REDAKCIO

De D. K. Jordan

Mi ĵus tralegis *ELNA-Bultenon* n-ron 20/21 kaj min speciale interesis rimarkoj pri la angla fuŝvorto *Ms.* en la *LETEROJ AL LA REDAKCIO*. Laŭ la leteroj unuflanke klopodo pri la problemo de *Ms.*-eco ŝajnas esti tute aŭ grandparte usona, ne internacia intereso; aliflanke neusona esperantisto proponas sendiskriminan uzon de *sinjorino* ĉe ĉiuj virinoj, supozeble inkluzive de infaninoj?

La problemo en la angla estas, ke ekzistas du titolvortoj pri virinoj (*Miss* kaj *Mrs.*), kiuj malsimilas laŭ la edziniĝinteco, sed nur unu titolvorto pri viroj (*Mr.* -- la ĉiam rara *Master* aktuale apenaŭ estas uzata). Kreskas sento en Usono, ke malbonas indiki tiom publike kaj konstante edziniĝintecon de virino, speciale ĉar la samon oni malegale ne indikas pri viroj. Kelku(l)oj penas "rektigi" per uzo de la fuŝvorto *Ms.* la lingvon.

Multaj lingvoj posedas vortojn ĝenerale similajn al *Mr.*, *Miss* kaj *Mrs.*, sed la rilatoj inter la vortoj ne nepre estas similaj al tiuj en la angla, kaj ne nepre estas afero nur de geedziĝo. La ĝenerala simileco onin tentas mispensi, ke la vortoj estas detale kaj precize la samaj. Ni konsideru la jenajn vortojn:

angla	hispana	ĉina	esperanta
Mr.	señor	xiānshēng	sinjoro
Mrs.	señora	tàitài	sinjorino
Miss	señorita	xiǎojiě	fraŭlino

En la angla, ĉiuj viroj povas esti *Mr.*, sed virinoj dividiĝas inter *Mrs.* kaj *Miss* laŭ edziniĝinteco (aŭ edzinigiteco se vi arĥeemas). Nur unu escepto ekzistas: t. e., ke edziniĝintino rajtas laŭ tradicio reteni titolon *Miss* se ŝi uzas sian antaŭedziniĝan nomon daŭre pro profesiaj celoj aŭ ree post malfeliĉa maledziniĝo.

La hispanajn vortojn oni verŝajne\* simile uzas, sed ekzistas pluraj esceptoj: mezaĝa aŭ maljuna virino devige estas *señora*, ne *señorita*, vortuzo iom simila al la angla *madam* de komercistoj kaj artistoj. (Kp. la francan *madame*.) Oni do ne nepre devas edziniĝi por fariĝi *señora*. En la angla, ŝanĝo de *Miss* al

*Mrs.* okazas nur per geedziĝo. Kontraŭe, en la hispana, *señora* estas digna, ne tro juna virino (samkiel *señor* estas digna, plenkreska viro), kaj *señorita* estas juna, iusence "eta" (tial nepre ne edziniĝinta) virino. Digneco kaj plenkreskeco (*señora*-eco) venas aŭ per aĝo aŭ per geedziĝo: vigla monstro de plenkreskeco.

La ĉina similas al la hispana, sed faras ankaŭ la malon: junulino povas resti *xiǎojiě* eĉ post sia edziniĝo kiel agnosko de sia juneco. (Dum tiu tempo ŝi uzas ankaŭ sian antaŭedziniĝan nomon. Post iom da tempo ŝi aldonas la nomon de sia edzo kaj ektitoligas *tàitài*. Post multaj jaroj ŝi emas ne plu uzi sian antaŭedziniĝan nomon.†)

La angla *Ms.* estas peno kontraŭstari kutimon emfazi la dependecon de virino je sia edzo. La titolvortoj de la hispana kaj de la ĉina ne nepre havas tian sencon, malgraŭ ĝenerala simileco. Nek en la hispana nek en la ĉina oni anticipus trovi klopodon pri kreo de fuŝvorto simila al la angla *Ms.* Sed kio estas la situacio en Esperanto?

Per la vorto *sinjorino* ni indikas edzinon. Sed laŭ *PIV* la vorto *sinjorino*, eĉ kiel titolvorto, ne signifas nur tion. Laŭ *PIV* "sinjorino" oni nomas: (1) damon (en senco de nobela virino aŭ de korestrino de poeto mezepoka), (2) mastrinon de sklavo aŭ dungintinon de servist(in)oj, (3) diinon aŭ adoratinon, (4) edzinigitan aŭ vidvan virinon. "Fraŭlino" estas (1) juna nobelino, (2) virino plenkreska sed needziniĝinta, (3) (nur en kelkaj landoj) iu ajn ino needziniĝinta, eĉ neplenkreska.

Samkiel ĉe ĉio, kion ni trovas en *PIV*, ni ne povas certiĝi ĉu la eksplikoj pri *sinjorino* kaj *fraŭlino* sekvas ĝisfunde veran interesesperantistan uzsperton aŭ nur emojn aŭ impresojn de la verkistoj. Sed laŭ *PIV* ĉi tiuj du vortoj ŝajnas al mi pli similaj al la hispana ol al la angla aŭ la ĉina vortuzo, kaj mi tial ne anticipus indiĝenan ekuzon de formo simila al la angla *Ms.* en Esperanto. (Usona solvo al anglalingva problemo ne estas probabla solvo al ne nepre sama esperantlingva problemo.) Antaŭ ol krei aŭ propagandi esperantan vorton laŭ la angla *Ms.*, oni rimarku kaj esploru la veran sencon de la esperantaj vortoj jam uzitaj kaj uzataj en la literaturo kaj en la konversacio. Bezono de "rektigado"

de nia vortuzo en tiu ĉi sfero povus esti nur bezono por plua studado de la lingvo en ties nuna stato. Kaj eĉ se videblus post plua esplorado ŝanĝneceso, ĉu ŝanĝo laŭ la fuŝangla Ms. estus nepre pli bona ol ŝanĝo al ĉina aŭ hispana (aŭ alia) uzado? Kial?

\* Mi ne parolas la hispanan kaj tial miaj observoj estas iom ŝancaj.

§ Komplike, la vortoj devenas en eŭropaj lingvoj el antaŭaj sociaj institucioj kaj ŝanĝiĝis dum la epokoj, ankoraŭ havante en kelkaj kuntekstoj antaŭajn sencojn. Kp. la hispanajn *señorita* kaj *señorito*, kiuj bele reliefigas la problemon.

+ Ne nur la vortoj *xiāojiě* kaj *tàitài* korespondas nur iam kaj nur proksimume al la stato de (ne)edziniĝinteco, sed la vorto *xiānshēng* nur iam kaj nur iom indikas kontraston inter viroj kaj virinoj; la vorto laŭparte signifas "antaŭe naskitan" kaj tial "instruiston"; virino kiu estas profesia instruistino tial titoliĝas ankaŭ *xiānshēng*, tute samkiel viro.

NdlR: Por ke la diskuto ne estu tute el vidpunkto vira, jen la sugestoj de du esperantistinoj: F-ino Ellen A. Lewis preferas vastigon de statindiko, t. e., ke ĉiu needziĝinta viro komencu uzi la titolon "fraŭlo". S-ino Gigi Harabagiu atentigas pri la state neŭtrala esprimo "samideanino". La redaktoro ne akordiĝas kun ĉi lasta sugesto, ĉar la nomitan esprimon oni povas uzi nur en pli-malpli amikeca, aŭ almenaŭ esperantista, etoso. Simile la esprimo "kamaradino" havas iom striktajn limojn, almenaŭ ekster SAT. Ĉiukaze, la redakcio provizore fermas la debaton pri Ms. (Iom flanke: The British Esperantist lastatempe liveris mirinde adekvatan tradukon de la angla esprimo women's lib: ŝiberigo.)

De Roĝero Bleno

Mi volas plendi pri Plena Ilustrita Vortaro pro ĝia kuriozigo de usonaj ŝtatnomoj. La ŝajne superfluaĵoj "-lando" kaj "-io" eble "ne estas senmotive", sed ili tro mlope atentigas detaletojn. Ja estas la riveroj Misuro, Kolorado kaj Misisipo\*--sed la Ohio

estas ankaŭ unu el niaj plej grandaj riveroj. Ĉu la PIV serioze sugestus la ŝtatnomon "Ohio"? Ankaŭ estas la rivero Tennessee; en Pensilvanio ekzistas valo Wyoming kaj urboj Indiana kaj California; en Ohio estas vilaĝetoj Florida kaj Texas. Fakte, preskaŭ ĉiu nomo aperas almenaŭ dufoje sur la mapo!

\* Helpo estas, ke la anglaj formoj *Mississippi* kaj *Missouri* jam havas -i.

#### NO USARLA PARA ALIMENTO

La ĉi-supra hispanlingva averto aperis sur sakoj da greno persipitaj de Meksikio al Irako en 1971. Ĉar la irakaj kamparanoj ne sciis, ke tio tradukiĝas "Ne uzu por manĝaĵo," kaj ne fidis al registaraj deklaroj pri tio, ili manĝis kaj manĝigis al siaj brutoj la venenon, kiu devis esti uzata nur por semado. Rezulte, ĉirkaŭ ses mil mortis, kaj cent mil havis damaĝon, plejparte vivdaŭran. Detala artikolo ("Pink Death in Iraq") aperas en *Reader's Digest*, nov. 1973.

Tio estis la plej amasa venenado en la historio de la homaro. Internacia lingvo tiel evidentiĝas ne luksaĵo, sed neceso por la pluvivo de la homo.

#### KION VI SCIAS PRI GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO?

"La Fédération espérantiste du Travail" (Esperantista Federacio de Laboro) en Francio proponas al vi dusemajnan ferion en tiu lando dum la somero 1974.

Internacia, frata etoso kun esperantistoj kaj neesperantistoj el diversaj landoj. Grupa vojaĝo eke de Parizo ĝis reveno al Parizo (eblo vojaĝi individue ĝis GDR). Aliĝo al FET ne postulata.

Se tiu vojaĝ-formulo interesas vin, bonvolu tuj sendi vian principan aliĝon (kiu tute ne devigas vin) al William Gilbert, 30, Rue Croix-Montaire, 37100 Tours, Francio. Detalajn informojn vi ricevos en ĝusta tempo.

#### SUPLEMENTO AL LA ELNA-ADRESARO


aperos frue en la venonta jaro. Realiĝu al ELNA nun pere de la oportuna aliĝilo trovebla sur la antaŭlasta paĝo de ĉi tiu numero!

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

P. O. Box 663, Houston, Texas 77001

504 North Fifth Street, Gallup, New Mexico 87301

INFORMOJ  
 por  
 SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO  
 (lasta plena semajno en februaro)



Amikeco trans limoj

AL: Ĉiuj membroj de ELNA:

A. Bonvolu memori la daton: de la 17a ĝis la 23a de februaro 1974.

B. Reklamiloj haveblaj:

- |   |            |   |
|---|------------|---|
| 1. Afiŝoj   | po 2¢      | <i>(Bonvole notu: Minimuma mendo por kartoj aŭ afiŝoj estas \$1.00 usona)</i> |
| 2. Salutkartoj, kiel en la pasinta jaro, aŭ kun aŭ sen la insigno | 3 por 10¢  |   |
| Salutkartoj kun la SIA-saluto en diversaj lingvoj ĉirkaŭ la rando | 3 por 10¢. |   |
| 3. Broŝuroj (haveblaj ĉe la libroservo)                           |            |   |

C. Sugestoj por proklamado:

- |  |  |
|--|--|
| 1. Ĵurnaloj                              | <i>(Ni helpas al vi komponi artikolojn, anoncojn, reklamojn, proklamojn, leterojn, laŭ via peto)</i> |
| 2. Radio, televido                       |  |
| 3. Reklamoj                              |  |
| 4. Proklamoj de urbestroj, ŝtatestroj    |  |
| 5. Leteroj al individuoj kaj organizaĵoj |  |

D. Sugestoj por solenaĵoj dum la SIA:

1. Publika kunveno
2. Seminario pri lingvo-unueco
3. Ekspozicioj en butikaj fenestroj
4. Pikniko
5. Prelegantaro konsistanta el diverslingvanoj
6. SIA-matenmanĝo
7. Ekspozicio ĉe publika biblioteko

E. Se oni faras fotografaĵojn, bonvolu inkluzivi, se eble, diverslingvanojn.

F. Raportoj:

1. Sur la dorsa flanko troviĝas raporto por plenumi kaj sendi al unu el la du supraj adresoj.
2. La raportu atingu nin plej malfrue la 9an de marto 1974.

*(Bonvolu turni)*

P. O. Box 663, Houston, Texas 77001  
504 North Fifth Street, Gallup, New Mexico 87301

DE:

\_\_\_\_\_  
(Nomo de societo, grupo, individuo aŭ klubo)

\_\_\_\_\_  
(Adreso)

Ĉi tiu raporto estu sendita al unu el la supraj adresoj antaŭ la 9a de marto 1973.

A. *Ĵurnalaj artikoloj*

1. Kiom da koloroj: \_\_\_\_\_
2. Kiom da ĵurnaloj: \_\_\_\_\_
3. Ĉu vi reklamis? Jes \_\_\_\_\_ Ne \_\_\_\_\_

B. *Radio*

1. Kiom da anoncetoj: \_\_\_\_\_
2. Kiom da tempo por ĉiuj programoj: \_\_\_\_\_
3. Intervjuoj (donu nomojn de personoj kaj voksignalojn de stacioj):  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

C. *Televido*

1. Kiom da anoncetoj: \_\_\_\_\_
2. Kiom da tempo por ĉiuj programoj: \_\_\_\_\_
3. Intervjuoj (donu nomojn de personoj kaj voksignalojn de stacioj):  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

D. *Aliaj proklamadoj*

1. Ekspozicioj (nomu la butikajn fenestrojn, bibliotekojn k. t. p.):  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
2. Priskribu aliajn:  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

E. Kiamaniere vi solenis la SIA-n? Bonvolu nombri la ĉeestantaron.  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

F. Ĉu estis proklamo de urbestro aŭ ŝtatestro? Se jes, bonvolu almeti trakopion.

G. Ĉu vi disdonis aŭ dissendis broŝurojn? Se jes, kiom, kaj kio estis la reago?

H. Ĉu vi havas sugestojn por la Semajno de Internacia Amikeco 1975?  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

I. Bonvolu almeti fotojn kun titoloj, trakopiojn de proklamadoj, ekzemplerojn de programoj, elĉerpaĵojn el ĵurnaloj (aldonu nomon de ĵurnalo kaj daton).  
(Aldonu folion se vi trovas tion necesa.)

ESPERANTO-LIGO POR NORDA AMERIKO BEZONAS VIN--KAJ VI BEZONAS ĜIN!

Tio ne estas blago. Per la starigo de Centra Oficejo ELNA eniras novan epokon--epokon de kies sukceso dependas la progreso de la internacia lingvo Esperanto en Usono kaj do sur la tuta tero. Tio estas epoko, en kiu via Ligo ofertas al vi jenajn servojn:

- 1) *ELNA-Bulteno* kaj *ELNA Newsletter*, kiuj en 1974 kuniĝos por formi fierigan dumonatan eldonadon dulingvan. Jam dum la pasinta jaro la organoj de ELNA faris konsiderindajn antaŭenpaŝojn. Ilia progreso atingos novajn altecojn en 1974, informante pri kongresoj kaj konferencoj, la monda lingvo-problemo, prilingvaj esploroj kaj ĉio alia, kio povus interesi vin.
- 2) Oficiala Libroservo de ELNA, kie liganoj ĝuos specialajn rabatojn. Ĝi informos vin pri ĉiu nova aperaĵo sur kampoj proza, poezia, scienca k. t. p.
- 3) Informservo. Tiu ĉi institucio provizos vin per la plej belaj haveblaj informiloj pri nia lingvo por uzi ĉe via propra disvastig-agado. Ĝi servos ankaŭ kiel adreso, kiun vi povos doni al ĉiu interesiĝanto por pliaj informoj pri la internacia lingvo.
- 4) Aŭd-vida servo de ELNA, kie vi povos je treege modesta kosto lui sonbendojn en Esperanto por senigi vin je ĉiu spuro de nacia akcento.
- 5) Centra Oficejo de ELNA, kiu kunordigos la agadon en tuta Usono por maksimuma efiko kaj kiel eble plej baldaŭa fina venko de Esperanto.

---

SENDU AL: S-ino Peggy Linker, Kasistino  
1414 Monroe Street  
Walla Walla, WA 99362

Jen mia ELNA-kotizo laŭ ĉi-suba indiko:

( ) Ordinara	\$10	( ) Familia	\$15
( ) Subtenanta	\$25	( ) Dumviva	\$200
( ) Patrona	\$50	( ) Donaco al ELNA	_____

SPECIALAJ TARIFOJ al studentoj malpli ol 30-jaraj kaj longdaŭraj membroj pli ol 65-jaraj: po \$5.00. Bonvolu indiki vian naskiĝdaton: \_\_\_\_\_ (Studenta tarifo aplikiĝas ankaŭ al junuloj malpli ol 21-jaraj.)

NOMO (s-ro) (s-ino) (f-ino) ( ) \_\_\_\_\_

ADRESO \_\_\_\_\_

URBO \_\_\_\_\_ ŜTATO \_\_\_\_\_ ZIPKODO \_\_\_\_\_

*Nuda inter lupoj*


Io nekredebla okazas: En kofro oni trovas malgrandan senhelpan infanon! Ĝin alportis polo, kiu ĝin savis ĝis ĉi tie--ĝis la fifama koncentrejo. Tio signifas novajn danĝerojn por la rezista grupo, kiu ĝis nun sukcesis kaŝe labori, preparante la tagon de la liberigo. Estas mallonge antaŭ la militfino. Nenies vivo estu endanĝerigota! Sed neniu estas tiel nuda, tiel sengarda antaŭ la murdistoj kiel la infano. Per ĝi finfine pruviĝas la kuraĝo kaj humaneco de la plej bravaj.

La romano *Nuda inter lupoj* de Bruno Apitz rakontas la veran historion de la infano Stefan-Jerzy Zweig. Tradukita el la germana. Ĉirkaŭ 500-paĝa, tuttole bindita. Antaŭpublica mendo, kiu validos ĝis la fino de januaro 1974, estas \$4.95. Post tiu dato, \$5.95. Mendu ĉe Esperanto Book Service, P. O. Box 508, Burlingame, CA 94010.

# El Popola Ĉinio

Esperanta Monata Ilustrita  
Specimeno akirebla senpage  
ABONTARIFO: 1 jaro \$2.20  
2 jaroj \$3.30  
3 jaroj \$4.40

ABONU ĈE: Esperanto Book Service  
P. O. Box 508  
Burlingame, CA 94010



ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA  
Post Office Box 275  
Fox Lake, Illinois 60020, U.S.A.

Nonprofit Organization  
U.S. POSTAGE  
PAID  
Fox Lake, Ill.  
Permit No. 32

Address Correction Requested  
Return Postage Guaranteed

NEWS PLEASE EXPEDITE